<u>*Tasko :*</u>
*El la donitaj radikoj, aldonante la sufiksojn « **–ig** », « **-iĝ** », aŭ « **nenion** » formu vortojn, kiuj gramatike kaj sence estas ĝustaj laŭ la resto de la frazo!*

# HELPU ! Estas Fajro !

(Modifita ekzerco el la lernilo : *Ĉu vi aŭdis, ke…* de Katalin Smidéliusz)

Mi estis leganta kiam iu stranga odoro ven___is el inter la folioj de la libro, almenaŭ mi tiel imagis. Poste ĝi fort___is. Mi alkuris al la komputilo, ĉio estis en ordo. Same ĉe la televidilo. Poste mi direkt___is min eksteren. Malferminte la enirpordon mi konstatis, ke densa, blanka fumo, terure akra kaj sufoka plen___is la tutan ŝtuparon. Ŝajne ĉiu dormis jam.
Mi komenc___is veki la najbarojn, sonor___i, bati la pordojn, kriadi kaj provadis malferm___i la fenestrojn. Baldaŭ mi devis reiri al nia loĝejo por spiri iom da pli tolerebla aero kaj vek___i miajn dormantojn. Vidante, ke kun la infanoj ni ne povas eskapi laŭ la ŝtuparo, ni ven___is la fajrobrigadon. Ni diris al ili, ke fajro ne videblas, sed la fumo kaj la stinko sufokos nin.
Ni malfermis ĉiujn fenestrojn por ___i trablovon kaj tenante tekstilaĵon antaŭ la buŝo kaj nazo, mi denove forlasis la loĝejon. Kurante malsupren mi vidis, ke la fumo maldens___is.
Mi alvenis samtempe kun la fajrobrigadanoj kaj la aliaj loĝantoj, sed ni ne trovis estingendan fajron. Forĵetita, nigr___inta poto ŝajn___is. al ni la kaŭzon de la fajro.
Baldaŭ evident___is, ke la sube loĝanta virino, pret___inte la dimanĉan tagmanĝon, pensis malŝalti la elektran fornon. Kvankam la butono turn___is, pro iu romp___o la forno ne malfunkci___is. Dum ili dormis, la varmego karb___is la poton.
Ĉi-foje ni estis bonŝancaj. Ni aerum___is la loĝejon ĝis la dua nokte, sed ĝi odoraĉas eĉ nun, post unu semajno.

**SOLVO por la teksto : Helpu ! Estas fajro !**

Mi estis leganta kiam iu stranga odoro **venis** el inter la folioj de la libro,almenaŭ mi tiel imagis. Poste ĝi **fortiĝis.** Mi alkuris al la komputilo, ĉio estis en ordo. Same ĉe la televidilo. Poste mi **direktis** min eksteren. Malferminte la enirpordon mi konstatis, ke densa, blanka fumo, terure akra kaj sufoka **plenigis** la tutan ŝtuparon. Ŝajne ĉiu dormis jam.
Mi **komencis** veki la najbarojn, **sonorigi**, bati la pordojn, kriadi kaj provadis **malfermi** la fenestrojn. Baldaŭ mi devis reiri al nia loĝejo por spiri iom da pli tolerebla aero kaj **veki** miajn dormantojn. Vidante, ke kun la infanoj ni ne povas eskapi laŭ la ŝtuparo, ni **venigis** la fajrobrigadon. Ni diris al ili, ke fajro ne videblas, sed la fumo kaj la stinko sufokos nin.
Ni malfermis ĉiujn fenestrojn por **igi** trablovon kaj tenante tekstilaĵon antaŭ la buŝo kaj nazo, mi denove forlasis la loĝejon. Kurante malsupren mi vidis, ke la fumo **maldensiĝis**.
Mi alvenis samtempe kun la fajrobrigadanoj kaj la aliaj loĝantoj, sed ni ne trovis estingendan fajron. Forĵetita, **nigriĝinta** poto **ŝajnigis** al ni la kaŭzon de la fajro. Baldaŭ **evidentiĝis,** ke la sube loĝanta virino, **pretiginte** la dimanĉan tagmanĝon, pensis malŝalti la elektran fornon. Kvankam la butono **turniĝis**, pro iu **rompiĝo** la forno ne **malfunkciiĝis.** Dum ili dormis, la varmego **karbigis** la poton. Ĉi-foje ni estis bonŝancaj. Ni **aerumis** la loĝejon ĝis la dua nokte, sed ĝi odoraĉas eĉ nun, post unu semajno.